# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 10 Oktobro, 2014

*Kara Leganto, jam pasis ankoraŭ unu monato, nia E-societo havis ankoraŭ unun kunsidon en la antaŭe kutima loko – Sulzer Biblioteko. La kunvenon klare priskribas sekretariino Tina S. (vd malsupre). Okazis ankoraŭ unu interesa evento: Ŝikagon vizitis familio de fama E-isto (vd raporton de d-ro Kordylewski). S-no Gregoro D. denove proponas al ni tradukon el mondfama kant-trezorejo. Eventoj kaj informoj abundas. Do, ek!* –La Redakcio.

**Lasta Kunsido (Septembro)** ~ Raportis de Tina Seastrom

– Du viroj helpis kun fotado en la biblioteko. – Humberto kunprenis buteran kukurbojn.

– Dwayne Dyer… Multaj specialaj personoj! – Les rakontis, kiel li instruis E-on en Krakovo.

– Ni babilis pri loknomojn. – Marko, kiel kutime venis per biciklo kaj pro tio pli frue forveturis!

– Les parolis pri E-o kiel lingvo facilparolata (Zamenhof verkis E-on kiel kriaĵo). Ĝi estas la plej facile lernebla el ĉiuj eŭropecaj lingvoj. – Mi esperas ke Viktoro revenos de Ukrainio kun medalo (koran dankon – VP)!

– Ni parolis pri ege bonaj gesamideanoj… Lydia Zamenhof estis juddevena bahajanino, kiu mortis kruele.

– Kent Jones estis handikapulo, kiusukcese helpis al la aliaj handikapuloj. Li preparis E-instruistojn, povantaj instrui E-on, ankaŭ li volis vidi E-on kiel lingvo de aeronaŭtiko. – Humberto diris, kiel li kunhelpe de Emotinal Freedom ekhavis pli bonan vidkapablon kaj perfektan sanstaton, dank'al akvo el puto.

– Jane Bixby, blinda prezidantino, estis ege helpema al la E-movado. Ankaŭ helpema estis Gertrude Novak.

– Maria Murphy, poldevena judino, estis tre parolema kaj Les respektis ŝin pro tio.

## Vizito de E-familio



S-ro So Gilsu, korea emerita profesoro pri ekonomia historio en Seulo kaj estinta estrarano de UEA (1989-1995), iniciatinto de "Azia Movado", fondinto de gazeto 'Esperanto en Azio', senlaca multjara aktivulo vizitis Ŝikagon dum du tagoj mezoktobre ĉi-jare, kune kun E-edzino, filo – denaska E-isto kun edzino kaj du junaj genepoj. Mi renkontis ilin en Linkolna Parko kaj ni kune promenis en la Konservatorio, Zoologia Ĝardeno, kie ni ĝuis vivan papiliaron en la Muzeo de Naturo. Mi memoras, kiel profesoro Gilsu prelegi dum la Jubilea UK en Varsovio (1987), vestita en blanka korea robo. Intertempe prof. Gilsu famiĝis pro siaj esperantistaj vojaĝoj tutmonde, pri kiuj li publikigis en Koreio kelkajn librojn, indikante Esperanton kiel vehiklon de de siaj internaciaj vojaĝoj.

*–Les Kordylewski*

## La Ruĝa Ruto

Denove nia estimata samsocietano Gregoro Dolgin faris tradukon (interpreton) de fama speco el la monda kantaro. Ĉi foje li varmigis mian animon, farinte esperantigon de fama ukraina populara aŭtora (ne popola) kanto – "La Ruĝa Ruro".

**"La Ruĝa Ruro"**, vortoj kaj muziko apartenas al Volodimir Ivasjuk (*sur la foto de poŝtmarko*), fariĝis, sendube, la plej renoma ukraina pop-rok-muzika kanto. V. Ivasjuk (n. 1949) verkis ĝin en 1970, estinte studento de medicina fakultato de Ĉernivca Universitato. Ankoraŭ en mezlernejo li trovis en la patra (lia patro estis ukraina verkisto Mikaelo Ivasjuk) libraro kolekton de kolomeaj popol-kantoj – kolomejkoj, eldonita en 1906. Poste, vagante tra korpataj huculaj vilaĝoj, Volodimir' trovis kelkajn aliajn variantojn pri "ruĝa ruto" kaj eĉ registris legendon pri la mistera sorĉ-herbo, kiu esti(a)s simbolo de la eterna kaj pura amo. Etnografoj kaj biologoj eĉ nun ne estas certaj, pri kiu kreskaĵo temas: *Rhododendron myrtifolium* aŭ *Rhododendron luteum* (vd foton). Ambaŭ kreskas en Karpata montaro kaj, laŭ onidiroj, ĝi (la flava floro) ruĝiĝas dum la nokto antaŭ la pagana festo de Kupajlo (kristana – St. Johana tago), kiun oni celebras la 7an de Julio (en katolika mondo – la 23an de Junio). La knabinoj, trovintaj ĝin, estus feliĉaj kaj amataj dum la tuta vivo.

Kaj en Septembro de 1970, sur la Teatra placo de Ĉernivco oni unuan fojon plenumis la kanton: ☞




la aŭtoro mem kune kun Olena Kuznecova. Ĉi kanto gajnis la Ĉef-premion en la Tut-sovetia konkurso "Kanto de la Jaro 1971", rimarku, ĝi estis plenumita en la ukraina (ne rusa) lingvo. Krom ĝi V. Ivasjuk kreis 107 kantojn, 53 aliajn muzik-verkojn, muzikon al multaj spektakloj. Li, faka kuracisto, bonege ludis pianon, violonon, gitaron, li estis ankaŭ sperta pentristo.

La 18an de Majo 1979 lia pendigita korpo estis trovita en Brjuĥoviĉa arbaro apud preskaŭ miliona urbego Lviv. Laŭ la oficiala versio ĝi estis sinmotigo, laŭ neoficiala versio la komponisto estis mortigita fare de agentoj de la kremla KGB (esp. – komitato de ŝtata sekureco). Entombigo de V. Ivasjuk (22an de Majo 1979) transformiĝia en amasan akcion de protesto kontraŭ la sovetia potenco.

Alloke, la 12an de Junio 2014 Ĝenerala prokuroro de Ukrainio renovigis la fermitan kriminalan proceson, dokumentaro de kiu ankoraŭ ĝis nun estas konservata en sekreta Moskva arkivo.

*–Viktoro Pajuk*

## *La Ruĝa Ruto*

Ho, konfesu al mi
La misteron de l' ĉarmo.
Kiam for estas vi,
Mi sopiras alarme.
Se en densa arbar'
Provas ruton vi serĉi,
Ĉu per ĝia nektar'
Min allogi, prisorĉi?

*Refreno*:
Ĉi sunan floron
Vi ne serĉu vespere,
Ĉar sen ĝi unusola
Iĝis vi por mi.
Ho, mia bela,
Kiel fonto plej hela,
Kiel strio impeta
Estas vi.

Iras Vi tra la nokt'
Laŭ arbara vojeto,
Rapidante al mi
Kun magia floreto.
Kredu, kara, ke ĝin
Tute ni ne bezonas,
Ja renkonten al vi
Amkonfes' mia sonas. (*Ref.*)
–Elukrainigis Gregoro Dolgin, 2014



## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago,
and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Cobbler Square Loft Apts.**
**1350 N. Wells St., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t.**

# La Jubilea 100-a UK

La jubilea, 100-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en la nord-franca urbo Lille, speciale elektita proksime de Boulogne-sur-Mer (esp. Bulonjo-ĉe-Maro), kie okazis la plej unua UK de Esperanto en 1905. Dezirantoj aliĝi al tiu la plej impona ĉiu jara evento de la tutmonda E-movado bv anonci sin al la CO de UEA. La plej oportunaj prezoj gravas ĝis la Nova 2015 jaro. Ne perdu vian ŝancon, jam aliĝis 259 personoj el 42 landoj (20an de Okt.).

# Sekvantaj Kunsidoj

Sekvantaj Oktobra kaj Novembra kunsidoj denove okazos laŭ la adreso: 1350 N. Wells St., Ŝikago, IL 60610. Bonvenon! Apudas stacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark/Division (Ruĝa linio). Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro laŭ la numero 773-344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵon.

Zamenhofa Bankedo estas planata en la sama konstruaĵo, kiu pasintjare – 24-a etaĝo de MDA, 63 E. Lake Ave. Dezirantoj partopreni la eventon devas registriĝi ĉe kasisto Karlo Gunn ĝis la 1an de Decembro, sendante ĉekon je $20/persone. Ne prokrastu!

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

**28an de Oktobro** – Ĉu Ukrainoj venkos moskvajn okupantojn? La Adreso: Cobbler Square Loft Apts., 1350 N. Wells St., Chicago

**25an de Novembro** – temo estos anoncata. La Adreso: Cobbler Square Loft Apts., 1350 N. Wells St., Chicago

**14an de Decembro** – Zamenhof Tago 12–4 p.t. La Adreso: MDA Konstruaĵo, 63 E. Lake Ave, 24-a Etaĝo, Chicago